2. *puto (-are)* (lat.) [*putus* pura, origine: trafiltrita, kribrita]
1) purigi
2) metafore a) reguli, ordigi
b) prikalkuli, taksi
c) kalkuli al io
pasive: esti rigardata
d) sekve de pripenso: opinii

am-puti
de-putaĵo, de-putito, de-putacio
dis-puti, dis-puto
re-putacio

*com-puto* adicii, sumigi [france *compter, conter* angle *compute, count*]

| | |
|---|---|
| *ars com-putandi* | kalendaro-prikalkulado |
| *com-putatio f.* | kalkulado |
| *com-putus m.* | prikalkulado de ekleziaj festotagoj |

ĉu kom-put-oro, -ilo, -ero? vivu la diskuto!
sed kom-p-i, -o, ilo? stranga ideo.

Literaturo:
1. F. A. Heinichens Lateinisch-deutsches Schulwörterbuch
B.G. Teubner, Leipzig und Berlin, 1931
2. Latein und Griechisch im deutschen Wortschatz
Volk und Wissen, VEVerlag, Berlin, 1982



## *MIFEGYNE* ™ - *RU 486*

*Laboratoires Exelgyn, Rue Christophe Colomb - FR 75008 Paris*

*Mifegyne*™ estas sinteza steroido kun anti-gestagena efiko, kiu baziĝas sur la konkura deteno de progesterono de la progesteronreceptoroj. *Mifegyne*™ estas la proprieta kaj komerca nomo *(Trade Mark)* de la firmao *Exelgyn* (FR). Konata estas la medikamento ankau sub la kodo RU 486 de la unua produktinto *Roussel Uclaf* (FR), franca filio-firmao *Marion Roussel Ltd.* de la firmao *Hoechst*.

Inventinto kaj aktuala posedanto de la licenco estas *Edouard Sakiz*, antaua estrarano de *Roussel Uclaf*, kiu tiam timis, ke la distribuo de la t. n. 'abortiga pilolo' povus damaĝi la reputacion de la firmao en Usono, do rezignis pri la produktado kaj permesis la transdonon de la rajto al *Exelgyn*, nova firmao de la inventinto *Sakiz*. Tiu firmao okupas nur 7 personojn kaj produktas nur *Mifegyne.*


La internacia neproprieta nomo *INN (International Nonproprietary Name)*, *BAN (British Approved Name)* kaj *DCF (Dénomination Commune Française)* estas *Mifepristone* kun specifaĵoj lau *USAN (United States Adoptes Name)-Permission Number* kaj *WHO (World Health Organisation)-Number*.

| | |
|---|---|
| *IUPAC-**formulado de** Mifepristone* | |
| *Beilstein Registry Number* | *5779404* |
| *Beilstein Preferred RN* | *84371-65-3* |
| *CAS (Chemical Abstracts Service) RN* | 84371-65-3 |
| Molekulformulo: | $C_{29} H_{35} N O_2$ |
| Molekulpezo | 429.60 |
| Denseco de la romba kristalstrukturo | 1.18 |

Lipofila kombinaĵo (pro tio mamnutrado dum la aplika tempo estas evitenda).

Baza skeleto de ĉiuj steroidoj estas sterano, hodiau nomita gonano, (ciklopentano-perhidrofenantreno) [vd. SR 50(1999)(1) p. 47]; pli detale, mifepristono estas modifikita estrano (18 C), tipo estra-4,9-dien-3-on, kun 4 eblaj stereoizomeraĵoj.

Kemia nomo (lau angla skribo de *CAS* kaj *UPAC*-formulado):
estra-4,9-dien-3-one, 11-[4-(dimethylamino)phenyl]-17-hydroxy-17-(1-propynyl)-, (11β,17β)-
Terapeute efikanta isomeraĵo estas la indikita (11β,17β)-formo.
Autoname: 11-(4-dimetilaminofenil)-17-hidroksi-13-metil-17-prop-1-inil-1,2,6,7,8,11,12,13,14,15,16,17-dodekahidro-ciklopenta<a>fenantren-3-on.
Jen la strukturformulo de la efikanta stereokomponaĵo:



Mifepriston

La efikanta dozo en 1 pilolo estas ekzakte 200 mg, sed la merkato-formo de *Mifegyne* pluse enhavas neaktivajn aldonaĵojn: La liverado okazas nur al klinikoj, la medikamento ne estas havebla en apotekoj, pro tio ne ekzistas t. n. 'nigra merkato'. Aldone ĝi estas submetita al la leĝo pri malpermesitaj drogoj.

La medikamenta interrompo de la gravedo estas permesata nur en klinikoj, kiuj ankau praktikas la kirurgian interrompon, sub observado de kuracisto, post ultrasonekzamenado, post ekzamenado de la sango-grupo kaj de la resusfaktoro k. a. restrikcioj.

Mifegyne devas esti ricevigita nur ĝis la 7a semajno de la gravedo (inter la 5a- 7a semajno), kaj efikas plej bone ĝis la 49a (au 50a) tago post la unua tago de la lasta menstruo (amenoreo-dauro). En Svedio kaj Britio la apliko estas permesita ĝis la 63a tago.





Kombinado kun nesteroida antireumatismaĵoj (NSAR) estas evitenda, ĉar ili ja posedas kvalitojn, kiuj ĝenas la prostaglandinsintezon.

La dozado ĉe medicina abortiga apliko okazas en formo de tri piloloj po 200 mg perbuŝe prenitaj. La biodisponebleco sumiĝas je 69%.

36 - 48 horoj post engluto de tiu perbuŝa unuopa dozo de tri piloloj (enhavantaj entute 600 mg de tiu anti-progesterono - progesterono mem estas la t. n. 'gravedeco-hormono') la graveda pacientino englutas 400 µg da Prostaglandino-$E_1$-derivato (INN *Misoprostol, Cytotec® {Boehringer« Searle}* au INN *Gemeprost, Cergen® {Searle}*), t. n. *tocolyticum* (anti-naskokonvulsiilo), kio kauzas la forpuŝon de la ĉ. kvinsemajnaĝa embrio.

*Misoprostol:* 3-hidroksi-5-okso-2-(4-hidroksi-4-metil-okten-1)-ciklopentil-1-metilheptanato (16 R, S-formo):





Gemeprost

La apliko de *Mifegyne* far gravedulino signifas kvazau same gravan decidon al abortigo kiel la t. n. forsuĉado au kuretado, kiu estas la sola metodo post la 7a au 8a semajno. Prenita en tiu tempo, Mifepristono subtenas la plilarĝigon de la utera orifico antau la kirurgia abortigo.

Normalaj medicinaj kromefikoj estas taksitaj ne specife gravaj, sed fakte okazas aborto pere de la du substancoj Mifepristono kaj Prostaglandino $E_1$. La plej grava risko estas, ke la aborto ne okazas komplete, ke restas graveda substanco en la utero, kio povas okazigi infekton au t. n. trofoblast-malsanigon. Pro tio necesas kontrolekzamenado kaj ankau kontrolo de neekzisto de eksterutera gravedo.

Sci. Rev. 49 (1998)(3)

La metodo estas memkomprene interveno en la homa hormonmastrumado, ĉar la progesteronsignalo por la subteno de la gravedo estas interrompita. Sed tiu interveno estas nur preterpasa, ĉar tre gravas, ke la fekundeco por venonta gravedeco ne estas malpliigita.

La metabolado estas iniciita per demetilado kaj hidroksilado de la 17-propinilĉeno pere de Citokromo P450 3A4. La duoniĝo-tempo mezuriĝas je 90 horoj.

Diskutado pri la leĝaj cirkonstancoj estas tre diversaj en la unuopaj landoj, memkomprene ankau la etikaj aspektoj. Entute oni konstatis, ke en Francio, kie Mifepristono estas allasita en 1986 sub la nomo RU 486, la nombro de la (konataj) abortoj ne plialtiĝis. Ĉ. nur 605 decidas sin al tiu medikamenta metodo. La klinikaj kostoj de abortigo ĉe apliko de Mifepristono estas en Francio la samaj kiel ĉe kuretado, en Germanio au Svisio kontraue nur triono ĝis dekono de la kirurgia hospitala traktado. Lau leĝa vidpunkto la apliko de Mifepristono akcentigas denove la debaton pri la t. n. limdatopermeso (germane *Fristenlösung*), ene de kiu la leĝo ĝenerale permesas la abortigon.

El religia vidpunkto temas antau ĉio pri la diskuto, kiam la homa feto estas vivaĵo kun korpo kaj animo, do lau religia koncepto kompleta homa vivaĵo. Tiu diskuto eble estas senfina, sed ne senkomenca, ĉar meze de la 13a jarcento Tomaso de *Aquin* laudire skribis, ke la vira feto ricevas sian animon post ok semajnoj, virina kontraue nur post 12 (!) - tio ja povas esti ebla, sed kiu do scias tion precize, verŝajne ne mezepoka sanktulo.

Medicinistoj ĝenerale supozas, ke la ekformiĝo de la cerbo kaj de la organoj komenciĝas ĉ. post la 49a gravedeco-tago. La ekformiĝo de la nervosistemo, kondiĉo por la sentiment-kapablo, plenfunkcias ĉ. nur je la fino de la tria monato.

Je la tempo de la publikigo la medikamento estas permesita en jenaj 11 landoj: FR, GB, SE, DE, AT, ES, BE, NL, DK, FI, GR.

Literaturo

Roth, H. J., Fenner, H., Arzneistoffe (1994) 2. Aufl., Georg Thieme Verlag, Stuttgart (DE). (Stereoizomeraĵaj formuloj).



Sci. Rev. 50 (1999)(3)

*RECENZO*

## *Qumran - Die Schriftrollen vom Toten Meer*
## La skribo-roloj de la Morta Maro

Ayala Sussmann, Ruth Peled
En kunlaboro kun la Israela Antikvaĵo-Instanco

Katalogo de la ekspozicio, *Stiftsbibliotek St. Gallen*
(surbaze de *Library of Congress, Washington D. C.*, 1993)
Eldonejo *Am Klosterhof, CH 9004 St. Gallen,* 1999
ISBN 3-906616-48-7 (144 p., 32.- CHF).

La dokumentigo havas jenajn partojn:
- la trovoj en la kavernoj: kodigitaj priskriboj de ĉiuj fragmentoj,
- la setlejo de Khirbet Qumran: keramikaĵoj, ligno, ledo, teksaĵoj,
- aneksaĵo pri la antikvahebreaj skriboformoj, la konservado,
- informoj pri publikigado kaj literaturo.

Unua rimarko: la tekstoj ne estas sekretaĵoj! La unua okkapa skipo sub gvido de la franca dominikana monaĥo *Roland de Vaux*, direktoro de *Ecole Biblique*, Jerusalemo, vekis la impreson de sekretigumado, ĉar la publikigo de la unuaj tekstoj dauris relative longe.

Kiam la publikigado (volumo I en 1955 kaj volumo VI nur en 1977) pli malrapidiĝis, sciencistoj avertis pri 'scienca skandalo *par exellence*'. Tamen volumo VIII aperis nur en 1990. Jam en la 1980aj jaroj la restriktiva alirebleco al la manuskriptoj estis publike atakita. Ekestiĝis la konataj konspiro-riproĉoj (Baigent, M.), ke la materialo enhavus nepublikigitajn sekretojn, kiuj povis skui la fundamentojn de jam ekzistantaj religioj. Tiam oni pligrandigis la sciencan stabon de 8 al pli ol 50. Intertempe ĝi ampleksas 60 fakulojn el 9 landoj.

La sinsekva publikigo okazas per *Oxford University Press* en la serio *Discoveries in the Judaean Desert (DJD)*, ekde 1955 aperis 24 volumoj, planitaj estas pluaj 13 volumoj, indeksvolumo kaj la